FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 Numero 3 julio / septembro 1998



Monaĥejo Maria Laach
celo de nia ekskurso dum la jarkunveno

42a Jarkunveno
Iom pri la ekskurso

Sabaton posttagmeze ni veturos per aŭtobuso trans la riveron Rhein (Rajn) al la famkonata monaĥejo Maria Laach (Laĥ), kiu situas en la montaro Eifel (ajfel) apud la plej granda Eifel-lago kun diametro de 2 kilometroj. Tiajn lagojn en Eifel oni nomas „Maar".
La benediktina monaĥejo estas ĉirkaŭata de arbaroj, kampoj kaj herbejoj. La preĝejo havas aĝon de 900 jaroj. Aldoniĝas la domoj de la monaĥoj, laborejoj kaj plantkulturejo. Ni certe povos spekti filmon pri la historio de la loko. Kaj ne mankos ebleco iom kafumi en la bela surloka gastejo.

Im nächsten Mai nach Frankreich

Unsere französischen Sprachfreunde haben zum vierten Mal in ihr Land eingeladen. Vom 8. bis 15. Mai 1999 versammeln sich Eisenbahner - Esperantisten aus ganz Europa zu ihrem Jahreskongreß in Le Mans. Ein viel versprechendes Programm ist in Vorbereitung. Allein das touristische Angebot lohnt die Fahrt nach Westfrankreich.
Die Anreise führt für die meisten zunächst nach Paris. Vom dortigen Bahnhof Montparnasse fahren Hochgeschwindigkeitszüge (TGV), in einer knappen Stunde nach Le Mans. Sie sind gegenüber den langsameren Normalzügen zuschlag- und reservierungspflichtig. Die Hotels, fast alle in der Nähe des Kongreßgebäudes, sind preiswert. In der Kategorie B beträgt der Preis je Person im Doppelzimmer einschließlich Frühstück 50 DM für eine Nacht. In der Kategorie A sind 78 DM zu zahlen. Bis zum 31. Januar 1999 beläuft sich der Kongreßbeitrag auf 93 DM für IFEF-Mitglieder. Später sind 118 DM fällig. Weitere Auskünfte sowie Anmeldevordrucke erhalten Sie von Ihrem Bezirksbeauftragten.
Unsere Kongreßstadt Le Mans liegt am Fluß Sarthe. Vor über 2000 Jahren vertrieben römische Truppen die dort lebenden Kelten und befestigten ihre Stadt Vindunum mit dicken Mauern und zahlreichen Türmen. Viel davon blieb bis heute erhalten, obwohl Le Mans unter Belagerungen und Kriegen zu leiden hatte, auch zu unserer Zeit. Heute ist die Stadt auch wegen ihres jährlichen Autorennens berühmt. Hiervon künden Rennwagen im Automobilmuseum. Zu den historischen Reichtümern zählen mittelalterliche Kult- und Profanbauten. Über dem malerischen Altstadtviertel mit Häusern aus dem 15. bis 17. Jahrhundert erhebt sich die prachtvolle, romanisch-gotische Kathedrale St. Julien. Sehenswert sind vor allem die wunderbaren Buntglasfenster.
Das Kongreßprogramm sieht wiederum Arbeitssitzungen vor, in denen organisatorische Fragen behandelt werden. In Fachvorträgen wird über die Neuerungen bei den Bahnen sowie über die Zusammenarbeit mit dem

Internationalen Verband der Eisenbahnen (UIC) berichtet. Zum Programm gehören aber auch musikalische und gesellige Veranstaltungen. Vor allem werden wir die bezaubernde Region um den Fluß Loire kennenlernen. Eines der Ausflugsziele ist das immer noch bewohnte, prächtige Schloß Le Lude, ein anderes Ziel das Märchenschloß Saumur. Es liegt inmitten blühender Gärten und bietet einen weiten Blick über das Flußtal. Nach Besuch einer Reitschule und eines Weinkellers wird der Tag mit einem Empfang im Esperanto-Schloß Grésillon gekrönt. Bei einer weiteren Fahrt blicken wir in eine Töpferwerkstatt, bewundern eine römische Brücke und lauschen liturgischen Gesängen in einer Klosterkirche. Das touristische Angebot wird schließlich mit einer romantischen Bahnfahrt in einem Museumszug beendet. Wer darüber hinaus die herbe Schönheit der Bretagne kennenlernen möchte, fährt anschließend zu einem dreitägigen Aufenthalt nach Colleville sur Mer. Diese Ausflüge führen unter anderem zum Mont St. Michel. Durch seine exponierte Lage am Meer galt der Berg über Jahrhunderte als uneinnehmbar. Auch hierüber gibt es von Ihrem Bezirksbeauftragten Informationen und Anmeldevordrucke.
Dieser 51. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner - Esperantisten (IFEF) verspricht wiederum, eine erfolgreiche Veranstaltung zu werden. Der deutsche Landesverband lädt seine Mitglieder, deren Angehörige und alle Freunde der Internationalen Sprache zur Teilnahme ein. Nutzen Sie die Chance, Esperanto mit Kollegen und Freunden aus über 20 Ländern zu praktizieren.
Auf Wiedersehen in Le Mans ! W.B.

Aus den Gruppen

Bremen

Maja ekskurso

La 13an de majo ni migris tra la Hemelinger Malaltaĵo.

Tiun ekskurson aranĝis kaj gvidis s-ro Karl-Heinz Marzahn. La renkontejo ja estis malfacile trovebla ĉe la rando de la malaltaĵo, sed ĉiuj, kiuj anoncis sian partoprenon alvenis akurate. Partoprenis gastoj el Radebeul: ges-roj Hoffmann, kiujn ni kore bonvenigis kaj kiuj estis dekomence okupitaj per interbabilado.
13-ope ni ekmarŝis sur digo laŭlonge de naturprotekta areo. S-ro Marzahn, unu el la iniciantoj kaj savantoj de tiu malgranda paradizo klarigis survoje, kiuj maloftaj bestoj vivas tie sovaĝe. Nia unua celo estis sportboathaveno. Ĉar jen la sezono komenciĝis, estis tie vigla vivo. En la centra konstruaĵo ni vizitis kafejon kaj observis, sidante sur granda verando, la aktivecon de la sportistoj. Rimarkinde multaj infanoj kaj junuloj okupiĝis per multaj aferoj. Multaj junuloj posedis malgrandajn velboatojn. Ili trejnis helpe de fakuloj la veladon kontraŭ la vento, la turniĝon kaj celveturadon. Estis interese, kiel ili jam regis tiun arton.
Laŭlonge de granda lago ni reiris al la digo. Apud tiu digo ni marŝis preter pumpilstacio, kiu evitas subakviĝon de la malaltaĵo. S-ro Marzahn, kiel digovokto,

povis multe rakonti al ni pri la aferoj ĉirkaŭ la digo. Lia tasko estas, observi la staton de la digo, ke ĝi povas kontraŭstari la plej altajn tajdojn.
Reirante, nin atendis malantaŭ la digo kaj inter altaj arboj kaŝanta gastejo „Zum Schlut". Malsataj kaj soifantaj ni okupis la por ni rezervitan tablon kaj ne daŭris longe, ĝis gaja humoro plenigis la ĉambron. Ni preskaŭ ne trovis finon kaj jam estis malhela ekstere, kiam ni klopodis trovi la vojon hejmen.
Sekvis adiaŭo kaj ni esprimis dankon al la organizanto.
Estis vere bela Maja Ekskurso!! Hg

Prospekt Neanderthal-Museum

Erst jetzt erreichte uns die Nachricht, daß unser langjähriges Mitglied der Gruppe Schwelm, Alfred Conzeth, schon vor Jahren einen Prospekt des Neanderthal-Museums ins Esperanto übersetzt hat. Dieser ist erhältlich bei: Neanderthal-Museum, Talstr. 300, 40822 Mettmann.
Leider können wir Alfred Conzeth nicht mehr danken, da wir erst jetzt erfuhren, daß er im Mai im 85. Lebensjahr verstorben ist. (s. Todesanzeigen).
Conzeth hat übrigens auch Uhren gefertigt, die statt des gebräuchlichen 2x12-Stunden-Zifferblattes ein 24-Stunden-Zifferblatt enthalten. Auf ihm sind die Ziffern 1 bis 24 entsprechend dem Sonnenstand angeordnet, also die 12 (Mittag) oben, die 24 (Mitternacht) unten, die 6. Stunde linke Mitte, die 18. Stunde rechte Mitte. Zum besseren Verständnis zeigen wir das Zifferblatt einer solchen Uhr.



Alois Haupenthal 80

La 27an de julio nia longtempa kunlaboranto povis festi sian 80an naskiĝtagon. Dum multaj jaroj li jam agas kiel distrikta komisiito en Saarbrücken kaj tie kreis tre bonajn rilatojn al la BSW-distriktestraro.
GEFA skribe gratulis al li, kaj jen ni ripetas niajn dezirojn, ke la sorto donu al li en la rondo de lia familio ankoraŭ multajn jarojn en kontentiga sanstato kaj kun vivoĝuo.
Ni aldonas nian dankon por tiu longa fidela kunlaboro ligitan kun la espero, ke lia emo por tio ne laciĝos, kaj ke ni povos saluti lin ankoraŭ tre ofte inter la distriktaj komisiitoj kaj en la jarkunvenoj.

Giessner
prezidanto



Kara papilio, se vi povus kanti,
sendube la homoj metus vin en kaĉon.

Otto Rösemann 75

Einer unserer Aktivsten hatte am 18. 5. einen runden Geburtstag, gerade in der Kongreßwoche. Leider war es ihm und seiner Frau Gertrud nicht möglich teilzunehmen, obwohl sie sich angemeldet hatten. Otto ist ein stiller, zuverlässiger und stets hilfsbereiter Mitarbeiter, dem wir und alle seine vielen Freunde noch viele Jahre in guter Gesundheit zusammen mit seiner Frau Gertrud wünschen. Ich als Hauptbeauftragter möchte ihm bei dieser Gelegenheit ganz besonders für seit vielen Jahren dauernde hervorragender Zusammenarbeit danken, die er als Mitglied des Arbeitsausschusses geleistet hat und noch immer leistet. Möge sie noch lange andauern.
Noch einmal und nachträglich ganz herzliche Glückwünsche.

Joachim Gießner
presidanto

Ni funebras pri

Helmut Rühl	(84)	13. 11. 1997	Bezirk Essen
Ignatz Pahnhenrich	(82)	12. 02. 1998	Bezirk Essen
Heinrich Rathmann	(82)	03. 06. 1998	Bezirk Hannover
Hans Scherbel	(82)	12. 06. 1998	Bezirk Nürnberg
Alfred Conzeth	(85)	05. 1998	Bezirk Köln

Sed la morto batas ĉie ajn. Ni funebras pri la estraranino de IFEF, nome la redaktorino ERNA HAUGE (DK). Ŝi forpasis post longa, pacience eltenita malsano, la 15an de junio 1998. Kaj malgraŭ malsano ŝi redaktis la „Internacian Fervojiston" ĝis antaŭ la 50a IFEF-Kongreso sen plendi. Kaj eĉ antaŭ kaj dum la 50a IFK ŝi kunpreparis kaj aktive laboris, ĉiam helpopreta por la kongresanoj.
Erna estis la modelo de vera esperantistino. Kvaronan jarcenton mi havis la okazon, ofte kunesti kun tiu ĉiam ĝentila, fidinda, modesta virino, kiam ŝi akompanis sian edzon, la IFEF-kasiston, okaze de kongresoj kaj estrarkunvenoj.
GEFA kaj mi persone kondolencis al la edzo Henning Hauge.

Joachim Giessner

La akcidento de Eschede

Atingis nin kore kondolencaj vortoj, ĉefe de hispanaj esperantistoj, sed ankaŭ el aliaj landoj. Ni tre dankas por tiu kunsento pro tiu terura akcidento, kiu postulis cent mortintojn kaj multege da vunditoj, kaj kiu tuŝis la tutan germanan popolon. Sed ĝi ankaŭ pruvis, ke la fervojistoj, ĉu en deĵoro aŭ ne, rapidege, fidinde kaj plenforte reagis kaj helpis.

GEFA

Koran dankon

ankaŭ en la nomo de mia edzino mi diras al ĉiuj, kiuj sendis tiom multe da karaj vortoj okaze de nia 60a diamanta edziĝfesto. Ni havis agrablan feston kun la familio intertempe multnombra. Precipe mi dankas por la bondeziroj rilate al ankoraŭ multaj komunaj vivojaroj, je kiuj ankaŭ ni esperas. Ni klopodos fari ĉion konservi kontentigan sanstaton.

Joachim Giessner

Esperanto - Senioren in Magdeburg

Ich war überrascht, wie wohltuend Magdeburg sich aus einer grauen Stadt wieder zu einem Kleinod der Städtebaukunst der Renaissance entwickelt hat. Durch Renovierung der alten Fassaden hat sie heute wieder das würdige Aussehen einer Landeshauptstadt. Daß Bundeskanzler Kohl diese Stadt am Vorabend unseres Seniorentreffens besucht hat, war sicher nur Zufall.
Wir, das sind die Senioren der Eisenbahner Esperanto - Vereinigung in der Stiftung BSW, trafen uns am 23. 04. 1998 zum traditionellen Jahrestreffen, um von „alten" Zeiten zu sprechen und um uns über die Zukunft der Eisenbahn und unserer Vereinigung Sorgen zu machen. Treffpunkt war das neue Inter-City Hotel, wo der Rahmen zwar ansprechend war, aber das Preis-Leistungsverhältnis beim Essen nicht ganz unseren Vorstellungen entsprach. Das Treffen selbst war sehr harmonisch und ließ keine Wünsche offen, dank Hilfe der örtlichen Esperantogruppe. Am Vormittag hielt ich ein kurzes Referat über die Geschichte Magdeburgs. Beim Nachmittagsspaziergang konnte sich jeder von der vorteilhaften Veränderung Magdeburgs überzeugen.
Die Arbeitssprache war Esperanto.

Rolf Terjung

Fervojaj Novaĵoj

Novaj indikiloj pri trajn-akurateco

La 19an de decembro 1997 oni ekfunkciigis la unuan indikilon pri akurateco de trajnoj en la ĉefstacio Frankfurt am Main. Per tia indikilo oni ĉiutage montras la akuratecan gradon de longdistancaj kaj kurtdistancaj trajnoj de la antaŭa tago laŭ tutgermana averaĝo, sed krome konkrete la saman rilate al la koncerna stacio. Pluaj 19 tiaj indikiloj estos instalataj en aliaj gravaj stacioj.
La montritaj ciferoj anoncas la procentaĵon de la akurataj trajnoj kaj de tiaj kun alveno ĝis kvin minutoj da malfruiĝo en elektitaj survojaj stacioj kaj en la finstacio.

Ĉiutage oni tiamaniere anoncas 840 longdistancajn trajnojn kun ĉ. 8600 haltoj kaj el kurtdistanca trafiko 4000 trajnojn kun 11700 haltoj, krome enurbaj S-trajnoj kun 4000 haltoj.
Celo de tiaj indikiloj estas - laŭ la vortoj de la DB-ĉefo Ludewig - pruvi, ke „ni tre severe traktas la temon ´akurateco´".

El GdED - inform Jogi

Diversaj Informoj

- Per antaŭ nelonge finkonstruita ponto apud Celle la plej longa fervojlinio sen bariloj en Eŭropo estas tiu inter Hamburg kaj Würzburg.
- La du centraj trajntrafikaj kontrolejoj, orienta en Berlin kaj okcidenta en Mainz, estas kunigataj en Frankfurt (M). En la nova retkontrola centro 34 regulistoj kontrolas ĉiutage1800 trajnojn. Ĉiumonate necesas, kaze de malfruoj, decidoj pro 12000 ĝis 15000 konfliktoj.
- Ekde 1999 fariĝos kiel memstaraj akciaj DB-kompanioj la sekcioj itinero, long-distanca trafiko, kurtdistanca trafiko kaj vartrafiko. Verŝajne ekestos ankaŭ aparta akcia kompanio por 6000 stacidomoj servantaj al la pasaĝertrafiko.
- Germana Fervojo (DB) kaj la japana fervojkompanio (JR) Central kontaktis pri kunlaboro rilate al specialveturilo, kiu kontrolas la sekurecon de fervojrelaro.
- DB, Austriaj Federaciaj Fervojoj (ÖBB) kaj Svisaj Federaciaj Fervojoj (SBB) kunligos siajn kurentajn retojn de la sama sistemo por reciproke uzi la kurenton kaze de bezono.
- La konstruo de 15 km longa grandrapida fervojlinio por la flughaveno Köln/-Bonn estas komencita. Kostoj: unu miliardo da markoj, ekfunkcio en la jaro 2001.
- Nuntempe trafikas en Italio 78 grandrapidaj Eŭrostar-trajnoj, precipe sur la linio Milano - Roma - Napoli. Ĝis la jaro 2000 Italaj ŝtataj Fervojoj (FS) volas aĉeti pluajn 60 Eŭrostar- kaj 48 pendolvagonarojn.
- Ĝis la jaro 2000 Ĉeĥaj Fervojoj (CD) trapasos rigoran raciigon. La nombro de laborlokoj reduktiĝos de nuntempe 100 000 al 83 000. 37% de la fervoja reto estos privatigata.
- Ĝis la jaro 2001 DB volas elspezi 81 miliardojn da markoj por investoj (novaj vagonoj, pasaĝer- kaj varstacioj, informa teknologio). DB devas mem pagi 34 miliardojn, kiujn iom post iom ĝi devas financi per kreditoj.
- „Bahntrans", memstara kompanio de DB, transprenis kun la transporto de pecvaroj ankaŭ 2000 el la iamaj 3600 kunlaborantoj de tiu servo.
- 25 jarojn ekzistas InterRail, la specifa oferto por junuloj ĝis 26 jaroj. La internacia bileto estas agnoskita en 30 ŝtatoj. La prezo dependas de fervojaj kaj maraj linioj samkiel de la daŭro de la valideco.
- La lokomotivriparejo en Meiningen renovigas ĉiujare ĉ. 35 vaporlokomotivojn de privataj fervojkompanioj, muzeoj kaj aliaj societoj el okcidenta Eŭropo.

- En oktobro 1998 malfermiĝos la novkonstruata, 48 km longa fervojlinio inter la ĉefstacio Oslo kaj la flughaveno Gardemoen.

Fonto: BahnZeit 9 - 12 /97 W.B

Ankaŭ tio okazas

Somero, suno, strando en Italio. Laŭdire aŭ ĉe sunbanado aŭ kapuĉino aŭ vino, ĉie, ĉie aŭdiĝas la tintado de radio-telefonoj (handy). Kial? Ĉar la italoj ne povas fidi al sia poŝto. Tial ili alkutimiĝis ĉion prizorgi telefone, ĉu por oficejo, firmao aŭ private. El 17 testleteroj, kiujn itala ĵurnalo forsendis, la unua alvenis post tri tagoj, la lastaj kvar post 16 tagoj.
Konkludo: Kiu tie al sia adoratino poŝte intencas konfesi sian amon, devas kalkuli, ke je la alveno de la amletero ŝi jam estas fianĉino de alia - supozeble posedanto de radio-telefono.

Ekstrakte el tagĵurnalo Jogi

„Kiom longe li jam prelegis?"
„Iom pli oi unu horon!"

„Pri kio temas?"
Tion li ankoraŭ ne diris."





Hühnerhof - Fachgespräch:
„Die Brutalität ist sehr gut.
Nur mit der Legalität hapert es noch."

Redaktfino por FE 4/98 estos la 25. 11. 1998
Stiftung Bahn - Sozialwerk Hauptvorstand Frankfurt am Main
Schritfleitung / redakcio: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen
Textgestaltung/tekstaranĝo: Klaus-Dieter Hartig, Kleine Annenstr. 34, 28199 Bremen